

# LA JUNNA VIVO



## ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

### Fervojistoj kaj merlofamilio.

En la stacio Nymburk (Ĉeĥoslovakujo) staras tre malnova vagono. En ĝi oni kolektas malplenajn, ladajn karbid-ujojn. Kiam la vagono estas plena, oni sendas ĝin al fabriko en Sokolovo. Post kelkaj tagoj ĝi de tie revenas malplena. Sed la lastan fojon paro da gemerloj faris neston ĉe lagrujo de la vagono. Kaj la merlino metis en la nesto kvar ovetojn. La fervojistoj kun intereso sekvis la nestadon de la birdoj, kaj atendis la aperon de la birdidoj. Sed subite la vagono devis iri al la fabriko en Sokolovo! Oni nenion povis fari kontraŭ tio: La vagono devis for. Sed la merlino ne lasis ĝeni sin. Ŝi restis sur la ovojn en la nesto. Kiam la merlo-edzo revenis, kun nutraĵo, ĝi time flugetis tra la stacio. Ĝi serĉis la vagonon kun la edzino. Dum kelkaj tagoj ĝi estis tre nerva, sed ĝi restis fidela, kaj atendis. Post kelkaj tagoj revenis la vagono el Sokolovo kun la merlino kaj — kvar junaj merlidoj. Kia bonveno! Ne nur sinjoro merlo estis ĝoja, sed ankaŭ la fervojistoj de Nymburk. Iliaj kamaradoj tre bone zorgis, ke dum la vojaĝo okazu nenio al la merlino.

El ĉeĥa ĵurnalo trad. de J. Rebiček, Olomouc.

(Eble la historio ŝajnas al vi nekredebla, sed la radiostacio Praha asertis, ke la afero efektive okazis).

### Serc-demandoj (la solvojn vi trovas aliloke).

Ĉu vi konas fiŝon, kiu kunportas literon?

Kiun specon de oro neniu deziras havi?

G. Schaedel, München, Germanujo.

## Gentila!

Du samideanoj estas en restoracio. La kelnero alportas por ili du fiŝojn sur unu plado. Unu fiŝo estas pli granda ol la alia.

La unua samideano metas la pli grandan fiŝon sur sian teleron. La alia diras: „Kara amiko, kiam oni servas sin unua, oni ne forgesu, ke ankaŭ la kunulo devas manĝi!”

„Nu,” diras la unua, „kion vi farus?”

„Mi prenis la malpli grandan fiŝon!”

„Nu, vi ja havas ĝin, do estu kontenta!”

Carlo Crovetto, Genova, Italujo.

## Postskribo.

Stultulo skribis jenan leteron al unu el siaj amikoj: „Mia kara Karlo, mi forgesis mian tabakujon ĉe vi. Faru al mi plezuron, kaj resendu ĝin per la portanto de ĉi tiu letero.”

En la momento, kiam li volas glufirmi la leteron, li retrovas sian tabakujon kaj aldonas: „Mi ĵus retrovis ĝin. Ne penu plu por serĉi ĝin.”

Post tio li fermas sian leteron kaj forsendas ĝin al la adreso de sia amiko.

## Lerta Servisto.

„Adalberto!”

„Sinjoro!”

„Zorgu, ke vi veku min morgaŭ matene je la kvara, ĉar mi foriros je la kvina.

„Sinjoro ĝentile sonorigos min, ĉu ne?”

## Pluva Ekskurso.

Dimanĉon, la 11-an de julio, mi iris kun mia tuta familio kaj amikoj, jam frue en la mateno, al monto. Ni kunportis en skoltaj sakoj multajn manĝaĵojn kaj kafon por trinki. Ni havis tomatojn, melonon, ŝinkon, ovojn, prunojn, persikojn, vinberojn, fromaĝon kaj buteron, kaj panon. Ĉe la piedo de granda karob-arbo, flanke de la monto, ni starigis la tendon, super terfendo. Tie ni instalas la kuirilojn.

Kiam ni foriris la vetero estis bela, sed venis nuboj sur la horizonto. Bedaŭrinde blovis mara vento, kaj baldaŭ la ĉielo fariĝis tute griza. Antaŭ la deknua horo pluvegis, kaj post kelkaj minutoj ni estis tute malsekaj. Ni forkuris por serĉi rifuĝejon ĉe Araboj.

Ili havis domon proksimume 50 metrojn de nia tendo. Ili tuj akceptis nin en sia hejmo. Do ni manĝis en tiu dometo, dum niaj vestaĵoj sekiĝis.

La araboj, pro sia religio, ne manĝis dum la tuta tago, nur en la nokto, dum tiu monato. Ili nomas tiun periodon „Ramadan”. Malgraŭ tio la dom-estro proponis al ni kafon, kiam ni finis la manĝadon.



Ĉiuj amikoj: araboj, francoj, spahisoj, eĉ la hundoj.

Poste revenis la suno, sed ne longe. Ni rapide faris kelkajn fotografaĵojn. Kaj je la kvara horo ni reiris al nia hejmo.

Dumvoje ankoraŭ pluvegis. Sed hejme ni surmetis aliajn vestojn, trinkis varman grogon, kaj por fariĝi varmaj ni danĉis ĉe fonografo.

F. J. Henry, Blida, Algerio.

### Kio valoras pli?

„Jen, Vilĉjo! Vi prenu la bebon, kaj mi portos la ovojn! Eble vi faligus la ovojn!”

### Solvoj de la ŝercdemandoj:

a-fiŝo (afiŝo) — ter-oro (teroro).

### Pri la „Logika Ago” (vidu la antaŭan numeron).

S-ro Traube maldungis la noktano gardiston, ĉar tiu rakontis ke li songis en la *nokto*. Tiam nokta gardisto ja ne rajtas songi!

La premion gajnis Betty Alexander, Seven Sisters, Kimrujo (Brit.).

## LA RAJTO DE LA UNUA OKUPANTO (rakonto por geknaboj).<sup>1)</sup>

*La suban rakonton mi verkis laŭ la samtema artikolo de la fama hispana pensulo kaj verkisto Miguel de Unamuno Jugo (1864—1936). Unamuno estis tre sendependa demokrato. Li estis universitata profesoro de la klasika greka lingvo, kaj multe verkis, prelegis kaj instruis. Oni ofte asertis ke li estas paradoksemulo, ĉar li kutimis diri la veron, „sian veron”. Ofte tiu kontraŭis banalajn tradiciojn kaj kutimojn, falsan prezentadon, ktp. Tio kaŭzis al li multajn ĝenojn. Sed lia nura deziro estis eduki homojn. Tiun noblan sintenon li montris eĉ kontraŭ la reakciularo, kiu ribelis kontraŭ la laŭleĝa demokrata registaro en Hispanujo en 1936. Ĝi kaŭzis lian morton en la lasta nokto de decembro 1936a.*

*Mi libere rerakontis la rakonton de Unamuno. Mi volis doni simplan legaĵon al miaj junaj amikoj esperantistaj. Se ĉi tiu rakonto vekos diskuton, laŭ la demandaro en la fino, „La Juna Vivo” volonte donos spacon por tio. Skribu do, kaj sendu viajn impresojn, viajn certe tre interesajn eĥojn, karaj junaj amikoj!*

J. Régulo Pérez, Kanariaj Insuloj.

Kiam vi naskiĝis, vi trovis gepatrojn. Ili donis al vi nutraĵojn, vestojn, hejmon, ludilojn, kaj tiel plu. Vi ne bezonis mem akiri ion per laboro. Vi trovis, ke kelkaj aĵoj apartenas al unu, aliaj aĵoj al aliaj. Kion vi havas, ĉion vi ricevis jam preta de viaj gepatroj aŭ de amikoj. Aŭ vi interŝanĝis tion kun geamikoj por aliaj aĵoj. Kaj se vi mem faris ion per viaj propraj manoj, vi uzis materialojn, kiujn oni donis al vi. Vi aĉetas per mono, kiun oni donis al vi, kaj ne per mono, kiun vi mem gajnis.

Dum vi legas ĉi tiun rakonton vi eble diros: „Ne, mi havas aĵon, kiu estas mia, kaj neniuj donis ĝin al mi. Mi trovis ĝin sur la strato. Mi prenis ĝin, kaj ĉar ĝi estas de neniuj, ĝi nun estas mia.”

Kompreneble, kion oni trovas, kaj kio apartenas al neniuj, tio apartenas al tiu, kiu trovis ĝin. Pri tiuj aĵoj oni diras, ke ili estas nenies, kaj kiu trovas ilin, tiu fariĝas la posedanto, laŭ la rajto de la unua okupanto.

Kiam en mia juneco ni trovis ludilon aŭ alian aĵon, kiun eble perdis kamarado, ni prenis ĝin kaj kantis laŭte:

Atentu, mi trovis aĵon;  
kvar fojojn mi tion kantos:  
se ne venos posedanto,  
por mi ĝi restos!

Kaj kiam la posedanto ne anoncis sin, ni tenis la objekton.

Aliaj eĉ ne kantis. Ili faris nenion por serĉi la posedanton, eĉ kiam ili sciis, kiu perdis la aĵon. Kompreneble tio estas rabo.

<sup>1)</sup> *Noto de la red.:* S-ro Perez aldonis „rakonto por geknaboj”, tamen ni tre volonte aŭdos ankaŭ la reagojn de la pli aĝaj legantoj!

Sed ekzistas multaj agoj, junaj amikoj, kiuj ŝajne ne estas raboj, sed fakte ili ja estas tio. Pri multaj aĵoj ni diras, ke ili estas nenies, sed fakte ili apartenas al ĉiuj. Floroj de publika ĝardeno ekzemple, estas ĉies, ĉar la ĝardenon oni prizorgas per mono de ĉiuj civitanoj kaj tial do la floroj estas por ĉies plezuro. Kaj se iu prenas floron kaj forportas ĝin, li faras rabon.

Kiam oni diras: „kio estas ĉies, tio estas nenies,” tio estas granda mensogo, kiun inventis rabistoj por rabi pli senbare.

Imagu, ke knabo venas en parkon, kaj li trovas benkon en la ombro de akacio. Sur la benko povus sidi tri knaboj. Nu, ĉar li estas sola, li ekkuŝas sur la benko kaj streĉas la membrojn. Tiam venas alia knabo. Li volas sidi, kaj petas ke la alia knabo lasu lokon por ambaŭ. Nun la unua knabo respondas: „Mi ne volas. Kial vi ne venis pli frue? Mi venis unua, tial mi havas rajton pri la tuta benko. Se vi volas sidi, jen estas alia benko”. Kaj la dua knabo diras: „Jes, sed tiu benko estas en la suno kaj mi volas sidi en la ombro. Ĉu mi sidu sur la tero, kiam estas loko sur la benko? Nu, sidu, kaj cedu al mi lokon!” La unua knabo respondas: „Mi jam diris al vi, ke mi ne volas. Sed kiam vi deziras ke mi cedu al vi lokon, donu al mi unu el tiuj oranĝoj, kiujn vi portas.” — Tiel faras la knabo sur la benko, ĉar li kredas ke li estas pli forta ol la alia knabo. Kaj tiu kompatindulo jam intencas foriri, kiam li vidas, ke alvenas gardisto de la parko. Tuj li minacas la alian, ke li vokos la gardiston. Tiam ekstaras la knabo, kiu ne estas tre amika al la gardisto, kaj foriras.

Nu, multaj homoj agas same. Ili diras ke tio, kion ili perforte akiris, apartenas al ili, ĉar ili alvenis unuaj. Alie estas, se oni okupas ion per laboro, ekzemple, kiam oni havas grundon, kaj plugas ĝin.

Pri tio mi rakontos ion al vi. Foje ŝipveturis dek familioj. La ŝipo pereis, kaj ili atingis dezertan insulon. La insulo estis tre riĉa kaj tre bela. Sur ĝi kreskis multaj fruktoj kaj ĝi povus nutri almenaŭ mil familiojn. Kiam la homoj rimarkis tion, ilia malfeliĉo ŝajnis malpli granda. Kelkaj eĉ ĝojis pro la okazo. Per la aĵoj, kiujn ili povis preni el la ŝipo ili komencis konstrui kabanojn kaj ekkulturi la teron. Ili kulturis ĝin kune, kaj al neniu venis la ideo dividi la insulon en dek pecojn. Ili sentis sin bonfartaj, ĉiuj kune, kaj tero ja abundis. — Se vi kun ses knaboj iros por manĝi melonojn, vi certe ne antaŭe dividus ilin. Vi ĉiuj manĝos el unu aŭ du bongustaj melonoj, kaj lasos la ceterajn por alia fojo. — Tiel faris ankaŭ la dek familioj. Nur ili loĝis sur la insulo. Ili kulturis tiom da tero kiom ili povis kaj lasis la ceteran parton. Sed unu el ili estis pli sagaca ol la aliaj. Li diris foje: „Nu, se okazus alia ŝip-

pereo kaj aliaj homoj venus sur la insulon, kaj ili ekkulturus ĝin, kion ni farus?"

La aliaj respondis: „Nu, ni tion permesus, ĉar ĉi tie povas vivi mil familioj!” — Sed li diris: „Ne, tion ni ne permesu! Ĉar ni venis unuaj, kaj la insulo estas nia, laŭ la rajto de la unua okupaĵo. Ŝajnas al mi plej bone, dividi ĝin en dek pecojn kaj doni unu pecon al ĉiu familio. Poste ni tamen kulturu nur parton de unu el la dek pecoj, ĉar ja ĉiu el la dek pecoj sufiĉas por vivteni cent familiojn.”

Tiel ili faris. Kaj baldaŭ vi vidos, kiel tiu, kiu konsilis tion, estis la plej sagaca, tio estas, la malbona, ĉar ofte sagaco utilas nur por malbono.

Post kelka tempo ree pereis ŝipo kontraŭ alia parto de la insulo. Tiu ŝipo portis kvar familiojn. Kaj ili ekloĝis sur tiu parto de la insulo, kien la sorto pelis ilin. Kiam la aliaj familioj rimarkis tion ili iris al tiu loko kaj diris: „Ĉi tiu insulo estas nia, ne via. Ni alvenis sur ĝin antaŭ vi kaj ni dividis ĝin inter ni. La tero ne estas via, sed ĝi apartenas al niaj familioj.” — La malfeliĉuloj respondis per bonaj vortoj: „Nu, ĉi tie estas loko por ĉiuj. Kaj ni, niaj kvar familioj kaj viaj dek, povas tre bone vivi, kaj eĉ mil familioj! Ni iros kun vi kaj ni ĉiuj laboros kune.” Sed tiu, kiu estis pli sagaca ol la aliaj, diris: „Ne eblas! Ni alvenis unuaj, kaj tial la insulo apartenas al ni. Se vi volas vivi ĉi tie, vi laboru por ni, kaj ni donos al vi domojn, vestojn kaj manĝaĵojn. Kaj se vi ne akceptas tion: jen estas la maro, de kie vi venis. Vi devos ree iri al ĝi. La sorto ja ne sendis vin unua!”

Kaj ĉar la lastaj estis malpli multaj kaj la unuaj pli potencaj, ili devis cedi. Tiel la kvar familioj eklaboris por la ceteraj dek. Kaj ĉi tiuj, la unuaj, faris nenion. Ili nur zorgis, ke la aliaj ne forkuru inter la montoj sur la insulo. Vi certe jam komprenas, ke la kvar familioj iĝis sklavoj de la aliaj.

Kaj nun, junaj amikoj, kia estas via opinio pri tio, kion faris la unuaj familioj al la postaj? Kion vi opinias pri la insulo? Antaŭ la alveno de la homoj, ĉu ĝi estis nenies, aŭ ĉu ĝi eble estis por ĉiuj, ĉar ĝi ja povus nutri ilin?

Tiuj demandoj ne estas tiel facilaj kaj klaraj kiel eble ŝajnas al vi. Parolu pri tio kun viaj gepatroj kaj demandu al ili, kion ili opinias pri la afero. Ĉar eble la rakonto vekos ĉe viaj gepatroj tute aliajn ideojn ol ĉe vi. Ankaŭ mi havas filojn, kaj al mi tre plaĉas, kiam miaj filoj pensas alie ol mi; kiam al ili multaj aferoj ŝajnas malbonaj, kiuj al mi ŝajnas bonaj. Ĉar se la filoj ĉiam pensadus kiel la patroj, ni ankoraŭ vivus kiel en la tempo de Adam kaj Eva.

Vi devas demandi al vi, de kie venas la aĵoj, kiujn viaj gepatroj donas al vi. Kiel ili akiras la aĵojn, kaj kiel via patro perlaboras sian monon. Kiam ni ne faras al ni tiajn demandojn poste povos esti multaj malbonoj. Kaj super ĉio vi atentu, ke en iu tago vi eble mem devos akiri, per laboro, viajn bezonaĵojn, eĉ se viaj gepatroj nun estas riĉaj.

Kaj nun mi volas diri al vi, antaŭ ol fini: „Estas pli bone, ke viaj gepatroj vivas ĝis vi finis la lernadon de via profesio, kaj ke ili lasas vin sur la mondo sen groŝo en la poŝo, sed kun la kutimo kaj amo al laboro, ol ke ili mortas nun, kiam vi ankoraŭ ne estas plenkreska, kaj postlasas al vi multan monon.

Juan Regulo Perez, Kanariaj Insuloj.

### T.J.O.-RUBRIKO.



(Skr. A. Schouten, No. 122, Oosthuizen, Ned.).

La „Federacio Esperantista de Lancashire kaj Cheshire” ĉi jare subtenos T.J.O.-n per 5 guldenoj, kiel simpatianta organizo. Bonega ekzemplo! Kiuj sekvos? Ĉefperantoj, faru vian eblon!

**Brazilo:** Nova ĉefperanto: s-ro Luiz Bartolomeo, Caixa Postal N. 201, est. S. Paulo, Bauru. — Ni deziras al li multan sukceson kaj esperas, ke li plenumos sian funkcion same fidele kiel f-ino de

Oliveira, kiu bedaŭrinde deziris transdoni sian taskon. De ĉi tie ni tutkore dankas ŝin pro ŝia ĝisnuna laboro!

**Francujo:** La ĝironumero de la nova ĉefperanto (s-ro Roger Bizet, Wierreau-Bois, par Samer) estas: Lille 182135. Bone notu!

**Italujo:** Pro la valoro de la itala liro (rilate al la guld.) la kotizo devis esti grave plialtigata. La jarkotizo al TJO (inkluzive de la 16-p. eldono de LJV) nun estas **375 L.** Por aspirantaj anoj la kotizo estas **150 L.**

**Maroko:** Nova ĉefperanto: s-ro Ben Sjon Ohana, Rue de la Kashba 1, Marrakech. — Ĝis nun en tiu lando oni neniam aktive propagandis por T.J.O. Multe ni esperas, ke la nova ĉefperanto sukcesos starigi fortan sektion!

**Nederlando:** Momente la TJO-sekcio kolektas propagandmaterialon por kompili ekspozicion, kiun la diversaj lokaj grupoj povas pruntepreni. — Ĉu eble bona ideo por aliaj sekcioj? — Por la nederlandaj anoj ni aldonas ke ili povas peti informojn aŭ doni sugestojn tiurilatajn al: s-ro A. de Smit, Karnemelksloot 19, Gouda.

## KORESPONDADRESOJ

**Aŭstrio:** Ok knabinoj (9-13-j.), komencantinoj, dez. kor. kun samaĝuloj. Skribu al: Dorli Steinacker, Schulstr. 16, Höningsberg bei Mürzzuschlag, Stm.

**Bulgarujo:** Stefan Krusev, Gara Jorna, Orehovica, 21-j. studento, dez. kor. kun gesamideanoj en la tuta mondo.

Onnik Sogomonjan, d-ro Nider 5, Burgas, dez. kor. kun filatelistoj en esperanta, itala kaj germana lingvoj.

**Germanujo:** Kiu sendos al mi 50 pm. de sia lando? Li ricevos 50 germanojn pm. de Jürgen Homburg (17-j.), 24a Hamburg 21, Flotowstr. 5.

La Biologia Laborkomunumo en Berlino dez. kor. pri botaniko kaj zoologio. Skribu al la prezidanto: Peter Ruff, Argonenweg 97, Berlin-Adlershof.

Mi serĉas kontakton kun konstru-praktikantoj kaj gestudentoj por kor. pri konstrumanieroj, -arto kaj arkitekturo. Günther Schaedel, München 22, Kaulbachstr. 61<sup>1</sup>. Por 4 respondkuponoj mi sendas al vi 50 div. postmilitajn germananajn poŝtmarkojn.

**Japanujo:** Miaj gelernantoj (17-20-j.) dez. kor. kaj interŝ. gazetojn, poŝtmarkojn, bildkartojn. Skribu al: Sugimoto-Hakaru, Hamadera-Motomati 5-578, Sakai-si, Oosaka-hu.

Geamikoj en la tuta mondo: Ni geedziĝis la 8-an de oktobro. Wim de Leeuw kaj Aagje Jansma. 't Zand (NH), Nederlando.

Ni donos premiojn (librojn kaj gazetabonojn) al ĉiu, kiu konigis nian programon al horo aŭ dancgrupo. Apartajn premiojn por belaj kaj gravaj salutoj. — Petu detalojn kaj programon de la III-a Internacia muzikfesto en junio 1949. Sekretariino. Ponciau, Wrexhem, Britujo.

#### LA PONTO

oficiala revuo de la Germana Esperanto-Asocio. Jarabono 7 respondkuponoj. Engelbertstr. 7, (13-b) München-Pasing, Germanujo. Ankaŭ abonebla ĉe TJO-Centro.

#### BINDITAJ JARKOLEKTOJ „LA JUNA VIVO”

aĉeteblaj de la jaroj: '34/'35, '35/'36 kaj '36/'37. Perfekta materialo por komenc- kaj daŭrigkursoj. Prezo po 1.— guld. Mendu ĉe TJO-Centro!

**KURSGVIDANTOJ!** Bonegan materialon vi trovas en la de J. Muusses, Purmerend, eldonitaj lernolibroj:

**Internacia Lernolibreto „La Juna Vivo” 0,50 gld.**

**Apartenanta vortlisto (speciale por nederlandanoj) 0,15 guld.**

**„Sub la Verda Standardo”** (plena metodo, konsistanta el: **Gvidilo** (nur por la gvidanto) ... 2,50 gld.

**„Laboriloj” I kaj II, po 0,90 „**

**„Memorigilo” ..... 0,50 „**

**Mendeblaj ĉe TJO-Centro, West-Grafdijk.**

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO** estas la ampleksa tutmonda

Esperanto-Organizaĵo, kies supertendenca, neŭtrala sinteno permesas la aliĝon de kiu ajn Esperantisto.

Per sia delegita reto, kiu ampleksas preskaŭ la tutan mondon, ĝi donas altvaloran servon al la praktika Esperantisto, por kiu la jarlibro de UEA estas konstanta konsultilo.

Petu senpagan prospekton ĉe **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.